MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 1

Januaro 2017 Kol.381/33

xxxx

ni devas kunvoki la kongreson, ĉe kiu vi devus elekti novan prezidanton aŭ aprobi la ĝisnunan estraron. Se vi havos iajn proponojn por la nova prezidanto, mi petas, sendu la proponojn al nia redakcio ĝis la fino de februaro 2017, ke ni povu prepari la balotojn.

Nun mi volas inviti vin al tiu kongreso, kiu okazos de la vendredo 21.4.2017 ĝis la dimanĉo 23.4.2017. Poste ĝin sekvos la tradicia lingva seminario ĝis la vendredo 28.4.2017, (samkaraktera kiel ĉiam okazadas en Skokovy sub la gvido de Jindřiška Drahotová). En la senbariera kasteleto Zámeček en Hodonín ĉe Kunštát estas mendita kongreso, seminario, ĉiuj programoj, tranoktado kaj plena manĝo. La trafikon de la trajnoj ni faciligos per aŭtomobiloj.

Atendas vin bela filmo „Venko de la norda poluso“ (ĉeĥe: Dobytí severního pólu), diversaj prelegoj, busa ekskurso al la kastelo Svojanov, danc-amuzo, teatra monologo pri la ĉeĥa verkistino Božena Němcová (ĉeĥlingve en la prezento de Stanislava Hošková) ktp.
La posttagmezojn kaj vesperojn de la lingva seminario ni dediĉos al ekskursoj aŭ al alia amuzaĵo laŭ la vetero.
Mi esperas, ke ni renkontiĝos en la menciita kasteleto en tre granda nombro kaj ke la tuta restado plaĉos al vi kaj ke ni ekkonos pluajn belajn lokojn de nia respubliko.
Mi ĝojatendas vin kaj ankoraŭfoje mi deziras al vi en la jaro 2017 ĉion plej bonan. Lenka Angelová

Karaj geamikoj,

la jaro 2016 estis sukcesa kaj eventoriĉa jaro por ESF. Nia Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) havis aparte grandan nombron da partoprenantoj; niaj stipendioj helpis al pluraj studentoj partopreni la interlingvistikajn kaj esperantologiajn studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando); nia regula subteno helpas kreski al Edukado.net, la plej grava internacia retejo por Esperanto-instruistoj. Ni subtenis konferencojn en Usono, Italio kaj Slovakio,

kaj ni provizis financadon por la staĝanto en la novjorka oficejo de UEA. Novjorko estas ankaŭ la loko por la simpozio pri lingvoj kaj disvolvado, celita al la konsciigo pri la graveco de lingva egaleco en la homa evoluo kaj homaj rajtoj. Nia esplorprogramo, interalie, helpis subteni novajn esplorilojn, kiel Historio de la Esperanto-Literaturo kaj la sociologian studon pri UEA. ESF havas du paralelajn celojn: subteni la esplorojn pri Esperanto kaj lingvaj aferoj ĝenerale, kaj ankaŭ subteni Esperanto-rilatajn edukprogramojn. Ni laboras kiel dek-membra estraro kun trideko da konsilantoj pri lingvopolitiko, lingvoplanado kaj rilataj kampoj.

Ni atente elektas niajn esplorprojektojn, subtenante rekonitajn universitatanojn, kaj niaj edukprogramoj estas inter la plej elstaraj kaj ĝisdataj en la mondo. Fakte, neniu alia Esperanto-rilata organizo havas pli fortajn programojn por subteni la altnivelan esploradon kaj doni gravajn servojn al Esperanto-parolantoj. La forto de ESF estas, interalie, en la forto de nia estraro: ekzemple, inter niaj estraranoj estas Esther Schor, Universitato Princeton — la aŭtoro de Ponto el vortoj: Esperanto kaj la revo pri universala lingvo (2016), kiu ricevis aparte bonajn recenzojn en la lastaj kelkaj semajnoj; Mark Fettes estas prezidanto de UEA, kaj mi lastatempe kunredaktis la specialan numeron de la scienca revuo INDECS dediĉitan al la fenomeno de Esperanto. Alia nia estrarano, Derek Roff, proksime kunlaboras kun CALICO (Komputile Subtenata Lingvo-Instrua Kunlaborantaro), kie ESF sponsoras prestiĝan ĉiujaran premion.

Je la fino de 2016 kaj la komenco de la nova jaro ni vidas kelkajn gravajn ŝanĝiĝojn en la mondo kaj ankaŭ en la Esperanto-movado. Nia fondaĵo forte laboras por kompreni tiujn ŝanĝiĝojn kaj por maksimumigi la eblojn ne nur antaŭenigi Esperanton, sed ankaŭ por atentigi la homojn pri lingvoj kaj la lingvo-diverseco en la mondo. Dum la tradiciaj Esperanto-organizoj laboregas por teni siajn poziciojn, la Esperanto-parolanta komunumo, kiel la tuto, kreskas, kaj ESF ludas

gravan rolon en tiu ĉi kresko. Por subteni tiun impulson oni devas antaŭeniri rapide kaj firmdecide.
Antaŭ iom da tempo nia fondaĵo estis ĉe la komenco de la lanĉo de Lernu.net, la programo, kiu nun havas pli ol 230 mil registritajn membrojn kaj kies retejo estis relanĉita ĉi-jare. Ni proksime sekvas la sociajn retojn, dum la kvanto da Esperanto-parolantoj altiĝas ĉe Facebook kaj en aliaj retoj, kaj pere de Duolingo. Se antaŭe oni devis aliĝi al tradiciaj Esperanto-organizoj por aliri la Esperanto-komunumon, la novuloj hodiaŭ povas fariĝi aktivaj esperantistoj tuj, preterirante la tradiciajn organizojn. ESF laboras por pritaksi tiun ĉi influon, kiun portas la novaj esperantistoj, kaj engaĝi ilin kiom eble plej multe en la praktikan uzon de Esperanto.
Dank' al la forta subteno de homoj ene de la Esperanto-komunumo kaj preter ĝi, ni povas respondi. Dum nia buĝeto kaj la programoj kreskas, estas tre grave, ke kresku ankaŭ nia subteno. Bv. konsideri subteni unu el la plej sukcesaj kaj influaj organizoj en la Esperanto-mondo hodiaŭ. Ni esperas, ke ankaŭ vi estos kontribuantoj al nia fondaĵo en tiu tre grava tempo. Dankon pro via fido en 2016 – ni kalkulas je via subteno de nia laboro ankaŭ en la jaro 2017 kaj poste.

Humphrey Tonkin ESF-prezidanto

La 83-a ITALA KONGRESO 20. - 27. 8. 2016

En la bela urbeto *Frascati*, kiu situas en la proksimeco de la ĉefurbo Romo, tri grandaj banderoloj en diversaj partoj de la urbeto informis pri la 83-a Itala Kongreso. Ĝi okazis fine de aŭgusto en la bela regiono de la kasteloj, kiun oni povis malkovri dum la ĉiutagaj ekskursoj. Ĝi estas unu el la ĉefaj turismaj altiroj de Italio por turistoj venantaj ĉi tien el ĉiuj anguloj de la mondo. La historian urbocentron de *Frascati* dominas la katedralo *San Pietro Apostolo*. En la subteg-

menta vendoplaco estis instalita ekspozicio pri Esperanto por la publiko.
La kongreson partoprenis iom pli ol 200 geesperantistoj el 30 landoj, inter ili pluraj gejunuloj. Ili pretigis bongustan frandan vesperon kaj bone amuziĝis. Dum la tuta semajno regis tre bona kaj varma etoso, ne nur pro la sunarda vetero, kiu superis tridek gradojn ĉiutage. La propono de programeroj variis same kiel la ekskursoj. La ĉeftemo de la kongreso estis „Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj“. Komence de la evento okazis lingvopolitika kolokvo, kies temo estis „Esperanto kaj minoritataj lingvoj“.
Ĝin partoprenis esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj. Dum la inaŭgura ceremonio festparolis la eksprezidanto de UEA Humphrey Tonkin pri „Esperanto kiel ideo kaj idealo“.
Dum la semajno okazis pluraj debatoj, seminarioj, atelieroj, libroprezentoj kaj vespere kulturaj programeroj. Koncertis Manŭel Rovere, ni spektis orientan kaj baratan dancojn, aŭskultis pian-koncerton, pupteatron, ĥoran kantadon. Ĉiumatene okazis tri diversnivelaj kursoj. Bazan kurson por komencantoj gvidis Anna Löwenstein, konversacian Peter Weide kaj perfektigan Nina Pietuchowska.

Paralele okazis aliaj programeroj. Seminario A pri: „La instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj“, gvidata de Kristin Tytgat kaj la seminario B pri: „Didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de Esperanto“ gvidata de Katalin Kováts. Ambaŭ estis interese prezentitaj dum la resuma prelego fine de la semajno. Ĉiutage estis duonhoraj prezentadoj de diversaj libroj, kiujn oni povis aĉeti en la libroservo. Tie estis instalita ankaŭ granda ekspozicio pri origamio. Interesatoj povis sekvi atelieron pri ĝi kaj krei plaĉajn aĵojn por si aŭ por siaj amikoj.
Alia interesa ateliero estis pri kalkulado per „sorobano“ gvidata de Kimie Markarian. Muzikan kant-atelieron gvidis Manŭel Rovere. Oni

povis elekti inter prelegoj: „Reĝo de la eŭropaj arbaroj“, „Lernado surbaze de projektoj“, „Zingibro el Hindujo Okcidenten“, „Virtuala vizito al Romo baroka: arto kaj ĉiutaga vivo“, „Origamio en la koro de la universo - universala arto komuniki“, „Instruado de lingvoj: principoj kaj historiaj hazardoj“, „Mia sperto kiel instruistino pri la sveda lingvo“.

Merkrede, dum la turisma tago, eblis elekti inter du tuttagaj ekskursoj. La unua gvidis interesatojn al Romo, kie en Vatikano ili estis akceptitaj de la Papo dum la ĝenerala aŭdienco. La dua tuttaga ekskurso celis pli naturan programon. Unue okazis vizito de la natura parko *Circeo*, poste vojaĝo laŭ la marbordo al la urbo *Terracina* kaj laste la vizito de sanktejo sur la monto *Spaccat* en la urbo *Gaeta*.
Dum aliaj ekskursoj oni vizitis urbojn: *Palestrina* kaj ĝian arkeologian muzeon, Romo, *Tuskolo, Tivoli* kaj *Subiaco, Ostia Antikva, Nemi, Albano, Ariccia, Grottaferrata, Castelgandolfo* kaj aliajn vidindaĵojn.

Bedaŭrinde en tiu tago okazis en la centra Italio forta tertremo, dum kiu pereis kelkcentoj da homoj. Fine de la semajno estis projekciata filmo pri la antikva urbo *Heraklea*, situanta en suda Italio ĉe la Ionia Maro. Tie okazos de la 26-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro la venontjara itala kongreso.
La fermo de la kongreso okazis en la urbeto *Monte Porzio Catone*, kie ni spektis dancojn kaj popolkantojn de la folklora ensemblo *Aranira*. Gaja muziko, viglaj kaj energiaj dancoj kreis unikan etoson, dum kiu ni bone amuziĝis kundancante ĉe la fino. Dankon al la organizantoj pro la sukcesa kaj bone aranĝita kongreso. Ni ĝuis neforgeseblajn momentojn kaj gajan etoson en la „Rondo familia“. La italaj kongresoj prezentas al la ĉeestantoj aron da kulturaj kaj turismaj eventoj.
Do, estos plezuro partopreni venontjare en *Heraklea*. *Liba* Gabalda

La 4-a granda lokŝumado en Bratislavo

En decembro 2016 mi la unuan fojon partoprenis la grandan lokŝumadon, kiun organizis Klubo de E-mental kun E-junularo en Bratislavo. Sabate matene mi eniris trajnon al eta grupo de pragaj esperantistoj kaj post 3 horoj nin bonvenigis Esperanto-flago en internaciaj manoj de Bratislavo.

Nia grupo konsistis el 20 personoj. Krom slovakoj el diversaj anguloj de Slovakio kaj ni ĉeĥoj tie estis ankoraŭ hungaroj, germano, aŭstrianoj, ukrainiano kaj italoj.

Ni vizitis faman kristnaskan foiron en la malnova urbo kaj gustumis bratislavan specialaĵon – farĉitajn lokŝojn (terpomajn flanojn) laŭ diversaj manieroj. La junaj partoprenantoj preferis lokŝojn kun dolĉaj internaĵoj – (ekzemple nuksoj, papavo, ĉokolado, acidaj ĉerizoj, marmelado, kazeo), ni preferis plenigaĵon kun brindzo, brasiko, anasaj grivoj, hepatoj kaj simile. Ni povis ankaŭ varmigi nin ĉe granda elekto de kristnaskaj varmegaj trinkaĵoj.

La posttagmezan promenadon tra arbarparko al la monteto Kamzík kun televida elsendejo kaj ĉaleto ni finis per telfera veturo malsupren kaj post eminenta komuna vespermanĝo en la fama restoracio „Divný Janko“ (Stranga Janko) ni tranoktis en la hotelo centre de la urbo. Dimanĉe matene ni trarigardis la renovigitan burgon Děvín kun viva betle-

hemo, ni admiris tute novan barokan ĝardenon, sub kiu kaŝas sin tegmenta parkejo.
La esperantisto Marteno montris al ni la belan urbon Bratislavon en ĝia tuta beleco inkluzive prezidentan palacon. Ankoraŭ rapide ni devis plenigi niajn stomakojn per eminentaj lokŝoj kaj huraaa al trajnoj.
Belege travivita antaŭkristnaska semajnfino kun la kolektivo de esperantistaj geamikoj kaj ekkono de nekonataj lokoj estas pli bona ol antaŭkristnaska hejma ordigo kaj bakado de multaj sukeraĵoj.

Lenka Angelová

Estas laŭdinde,

ke la praga klubejo Ve Smečkách estas bonege utiligata. La foto montras la 15-an de decembro 2016 **la Tagon de la E-libro**, kiam la partoprenantoj rememoris la naskiĝdatrevenon de d-ro L. L. Zamenhof.

Trista anonco

La ŝatata, senĉese gaja kaj optimismoplena s-ino Josefa Daňková (panjo de nia membrino Jana Holcová) forpasis en siaj respektindaj 101 ½ jaroj la 18-an de oktobro 2016 (*1.3.1915). Honoron al ŝia memoro.

red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.